2.ª Ep. AÑO IV, N.º 18 (154) MARZO-ABRIL 1966



DE LA FEDERACION ESPERANTISTA ESPAÑOLA

ILUSTRE VISITANTE



El Dr. Tadros Megalli, conocido esperantista egipcio, durante su interesante conferencia sobre «Egipto antiguo y moderno», en la Cátedra de Esperanto de la Universidad de la Laguna.

BOLETIN DE LA FEDERACION ESPERANTISTA ESPAÑOLA

Direktoro: Domingo Martínez Benavente

Redakcia Komitato:
Angel Salete
Nicolás L. Escartín
Emilio Gastón

ADRESOJ:

Hispana Esperanto Federacio
Prezidanto:
Dro. Miguel Sancho Izquierdo
Str. Torre Nueva, 30, 1.°
ZARAGOZA

Ĝenerala korespondado:
Sekretariino:
Inés Gastón
P.° Marina Moreno, 35, 4.° Dcha.
ZARAGOZA

Monsendoj:
Kasistino:
María Pilar Gómez
Str. Bolonia, 14, 1.°
ZARAGOZA

Sendaĵojn pri statistiko kaj informado al:
S-ro. Salvador Aragay
Str. Arce, 8
CORNELLÁ (Barcelona) Hispanio

Libroservo:
Sekretariejo de H. E. F.
P.° Marina Moreno, 35, 4.° dcha.
Ĉekkonto: n.° 14114, Banco de Bilbao
ZARAGOZA

Jarkotizo por eksterlando: 100 ptojn.

La enhavo de la artikoloj ĉi tie publikigitaj ne reprezentas la oficialan opinion de H. E. F., escepte en okazo de oficiala komuniko; do pri la artikoloj respondecas la aŭtoroj mem.

de secretaría

Como todos sabéis, Bilbao va a ser este año escenario de nuestro XXVII Congreso de Esperanto. La veteranía, entusiasmo y bien hacer de nuestros «samideanoj», hacen que todos esperemos el Congreso con la ilusión de pasar unos días inolvidables.

Ahora sólo hace falta que los esperantistas españoles no defraudemos a nuestros compañeros de Bilbao y nos inscribamos cuanto antes al XXVII Congreso de Hispana Esperanto Federacio. Con esto, aparte de darles la satisfacción que nuestra adhesión representa, facilitamos la labor de nuestros amigos. Así, pues, no retraséis ni una fecha más el enviar vuestra «aliĝilo» debidamente cumplimentada.

A las preguntas formuladas en el número anterior referentes a estadística, hemos recibido contestación del Esperanto-Grupo de Villanueva y Geltrú por medio de su Presidente P. José M.ª Claramunt Sch. P.; esperamos de la comprensión y colaboración de todos que no se harán esperar las respuestas de los restantes Grupos.

Nuevamente, gracias por la colaboración que de todos esperamos.

El próximo número de BOLETIN, mayo-junio, se enviará como el pasado año contra reembolso de la cotización anual a todo el que hasta esa fecha no la haya pagado, lo que comunico para conocimiento de aquellos a quienes concierna. Agradeciendo la colaboración de todos los que la hayan pagado antes del 30 de abril.

Mendu jam:

- Poŝkartojn kaj glumarkojn de nia XXVIIª Kongreso de Esperanto.
- Poŝtk. 2 ptoj. po ekz.; Glumark. 1,50 folieto.
- Poŝtk. kun la J. I. K. — alegorio, 6 ptojn. deko.
- Kovertojn kun la teksto "Esperanto-La Lengua Internacional", 5,00 ptojn. deko.

Kara hispana samideanaro!

Kore mi salutas vin kaj vokas ĉiujn por la nacia hispana kongreso en Bilbao. La sola nomo de tiu ĉi urbo allogas la amantojn de la kulturo, de la grandaj projektoj kaj realaĵoj en la industrio, la komerco kaj eĉ en la agrikulturo; ĝi montras imitindajn ekzemplojn. La Altaj Fornoj proklamas tra senhalta teknika sinfonio la progresojn de la provinco, kie naskiĝis gloraj filoj de Hispanujo, kaj la rivero Nervion kunigas per multenombraj ŝipoj la urbon kun la tuta mondo.

Por honori Bilbaon en la kultura kampo sufiĉas, ke ni nomu la Universitaton de Deŭsto. Minoriĉa montaro ĉirkaŭbrakas la urbon, kiu atendas multajn samideanojn.

Ĉiu esperanta kongreso estas grava fakto por la sukceso de nia idealo, kaj tiu ĉi granda nacia kongreso altiros la okulojn de la tuta ĉarma kantabra regiono, kies naturo rememorigas al mi la eterne verdajn tropikajn landojn.

Sendube honorigos nian kongreson la alveno de multaj samideanoj el eksterlando kaj ili certe ĝuos la belecon de nia milda marbordo.

Mi invitas ĉiujn esperantistojn partopreni nian ĉiujaran nacian feston en Bilbao. Zorgu ni por ke tiu kongreso impresos per la vido, la aŭdado kaj sur ĉio per la koro.

En la Ateneo de Bilbao mi aŭdis antaŭ jaroj paroladon de l'granda meksika poeto Francisko de Ikaza kaj mi rememoras lian poemeton dediĉitan al Granado, kiam li kun sia edzino supreniris Alhambron, kaj blindulo demandis de ili almozon; kion mi tradukas kaj dediĉas al Bilbao:

Donu almozon, edzino,
al ĉi tiu malriĉulo,
ĉar estas doloro sen fino
vivi ĉi tie... blindulo.

FELIKSO DIEZ MATEO
Prezidanto de la Loka Kongresa Komitato

KIE ILI ESTAS?

(JES)

Antaŭ ol komenci elvolvi mian personan opinion, mi deziras ripeti, kion BOLETIN diras ĉiunumere: "Pri la artikoloj respondecas la aŭtoroj mem". Eble miaj ideoj, ideoj de simpla membro de la Federacio, ne ligita al ĝia Estraro, povas ŝajni ŝokaj al multaj.

Jen la afero. Esperantisto, laŭdifine, estas "persono kiu konas kaj uzas esperanton".

Tio signifas, verŝajne, ke fininte kurson, vi povas meti steleton sur vian bruston, kaj fiere atendi la venon de eksterlandanoj samstelitaj por ilin akompani tra la belaĵoj de via urbo. Aŭ, se via poŝo monŝvelas, vi povas ankaŭ trakuri landojn kaj urbojn kun helpo de afablaj samideanoj, kiuj samkonscie plenumos sian esperantistan devon, trinkante bieron kun vi je la fina venko de esperanto.

Kompreneble, la bazo de esperantismo devas esti tiu feliĉa homo.

Sed nun, venante al la konkreta kazo de nia lando, mi ŝatus scii, kie sin kaŝas la kremo de nia esperantistaro. Kie estas niaj verkistoj, niaj poetoj, niaj parolistoj.

Sufiĉas ke ili aperu nur en niaj Kongresoj, por majstre prelegi unu fojon ĉiujare?

Ankoraŭ pli konkrete. Eblas, ke la paĝoj de nia BOLETIN, kiu estas la ligilo de la hispanaj esperantistoj, pleniĝu el eksteraj novaĵoj —kelkfoje tute ne interesaj el esperantista vidpunkto— dum niaj verkistoj gajnas literaturajn premiojn en foraj landoj?

Okazas ke, spirite, ni ĉiuj estas "laŭdifinaj" esperantistoj?

Atentu, ke mi simple starigas demadojn. Ĝia diskutado povus esti konvena, distra aŭ simple kurioza por legantoj. Sed, kio estas absolute necesa por la firma marŝo de esperanto en nia lando, estas efektivaj solvoj. Kunlaboro. Pruvoj el vivanteco.

Kaj tiu vivanteco devas respeguliĝi en nia Revuo. Granda estas ja la respondeco de tiuj, kiuj povus briligi la vivon de la hispana esperantismo per sia talento, kaj komode gardas ĝian esencon por disvolvi ĝin, kiel superan kaj kaŝindan trezoron, dum nur la Kongresaj tagoj.

Estas fakto, ke aktuale Hispanio estas lando de pasivaj esperantistoj. Kaj ne pro manko da homoj, kiuj alten povus meti siajn nomojn, se ili volus dediĉi sian kapablon al nia afero.

Certe, konvenas klarigi ke ni havas ankaŭ aliajn, kiuj estas firmaj subtenoj kaj aktivaj gvidantoj de esperantismo en nia lando. Sed ne decas proklami iliajn nomojn, ne menciinte la nomojn de la pasivuloj.

Io estas tute klara. Ni, simplaj esperantistoj, homoj portantaj verdan stelon surjake kaj havante preskaŭ riverencan ideon pri la noblaj celoj de esperanto, bezonas koni la opinion kaj la pensojn de tiuj elituloj, kiuj proprarajte elstaras en la panoramo de niaj Kongresoj unufoje jare, kaj poste malaperas en la ombroj de trankvileco kaj nenifarado.

Kaj la natura tereno, kie iliaj ideoj devus ĝermi kaj flori, estas la paĝoj de nia BOLETIN. Kie mi, simpla membro de HEF, esperas trovi la laboron de niaj plej elstaraj samideanoj.

Complaciendo las numerosas peticiones, tanto de esperantistas españoles como de extranjeros de celebrar en España un Congreso Universal de Esperanto, la Directiva de H. E. F. se complace en comunicar a todos sus asociados españoles y a sus abonados del extranjero, que, con fecha 12 de enero de 1966, ha cursado una invitación oficial a la Universala Esperanto Asocio para celebrar en nuestra nación el 53 Congreso Universal de Esperanto el año 1968.



Niaj pioniroj...

José Santamaria

De la *jaro 1909 ĝis 1913*, oni publikis en Bilbao, urbo en kiu okazos ĉi tiu jaro nia XXVIIa Kongreso de Esperanto, interesan monatan gazeton. Sub la titolo «Nova Sento» ĝi heroldis la Esperantismon de niaj samideanoj de Bilbao kaj enhavis, krom la ordinaraj novaĵoj de la Esperanto-Grupo, literaturan fakon en kiu aperis la verkaĵoj de tiuj, kiuj ĉiam kaj kaj ĉie sentas strebadon al Belarto. Certe, multaj el la tiamaj legantoj de tiu revuo —feliĉuloj, aŭ malfeliĉuloj, kiuj sukcesis spiti la parcon— ĝojos retrovi en ĉi tiu numero de Boletín belan kontribuaĵon de unu el la tiutempaj idealistoj. Ni parolas pri «ĉe la sojlo de l'mistero», kiun sub la plumnomo «Virgilio» verkis speciale por nia gazeto, nia samideano José Santamaría, fidela pioniro de nia movado, de antaŭ 61 jaroj.

Nia samideano José Santamaría, naskiĝis en Deusto (Bilbao) en la jaro 1887, kaj fariĝis esperantisto en la jaro 1905; el bankoficista profesio loĝis dum 30 jaroj for de Bilbao. Same kiel multaj aliaj pioniroj de nia movado li aktive laboris por Esperanto kaj plej multe klopodis disvastigi ĝin. Liajn respondojn al nia demandaro la leganto certe ĝuos profitplene.

1.—*Kie kaj kiam vi kontaktis kun Esperanto kaj eklernis ĝin?* — Aperis en la ĵurnaloj de Bilbao —kie mi loĝis— kelkaj artikoloj pri Esperanto. Ili altiris mian atenton kaj tiun de miaj amikoj. Ni decidis, do, lerni ĝin per ni mem, kaj ni trafis nian celon. Tio okazis en la jaro 1905.


2.—*Kiu estis la ĉefa faktoro, kiu instigis vin lerni Esperanton?* — Nur la ideo interkonatiĝi kun alilandaj gejunuloj kaj informi min pri ilia vivmaniero, moroj, ideoj, kaj ampleksigi tiel mian mondon.

3.—*Laŭ via opinio, kiu estas la ĉefa celo de Internacia helpa lingvo?* — La alproksimiĝo de la homaro, unue. Fincele, fari el la mondo, «unu grandan rondon familian». Se la lingvo internacia nur celus praktikajn profitojn, mi certe ne estus esperantisto.

4.—*Kion vi —spertulo— konsilus al la esperantista aro por priviglig kaj pligrandigi nian movadon?* — Altiri la intelektulojn, kiuj, malfeliĉe, malestimas pro ignorado, la genian kreitaĵon de nia lingvo. Laŭ mia opinio, la movado esperantista povas esti komparata kun la unuaj tempoj de la kristanismo: komence nur humilaj personoj subtenis kaj sinoferis por la ideo.

5.—*Post via longa vivo esperantista kian mesaĝon vi transdonus al la nuntempaj esperantistoj?* — Ne perdi la tempon en diskutoj pri tiu aŭ alia neperfektaĵo de la lingvo, lasante tiun aferon al la Akademio, kiu estis kreita por tiu celo.

3.ª JUNULARA ORATORA KONKURSO EN BILBAO



Dum la venonta Hispana E-Kongreso okazos ĝenerala kunveno de HEJS (Junulara Sekcio de HEF) kie delegitoj kaj anoj povos taksi kaj juĝi la faritan laboron de la nova estraro. Sed dezirante altniveligi la junularan aranĝon oni organizos «Junularan Oratoran Konkurson» en Esperanto. Tiel do, ni petas al ĉiuj gejunuloj, kiuj ĉeestos la nacian kongreson en Bilbao, ke ili sin preparu partopreni la menciitan konkurson. Kiel ĉiujare, oni disdonos al la gajnintoj valorajn premiojn: Libroj, abonoj al mondfamaj revuoj, ktp.

Okaze de la antaŭaj oratoraj konkursoj oni indikis diversajn temojn, kiujn la partoprenintoj devus elekti, sed nun ni NE DEZIRAS POSTULI TION. Tiel do, la estraro interkonsentis pri la jeno:

ĈIUJ GEJUNULOJ POVOS PAROLI PRI KIA AJN TEMO DE ILI PREFERATA

Tamen dezirante helpi kaj faciligi la aferon al la konkursantoj ni sekve indikas kelkajn temojn kiel helpilo. Eble ili vekos en la konkursantoj diversajn ideojn.

Ĉu Cervantes verkis altvalorajn verkaĵojn, laŭ internacia koncepto?

Ĉu la Esperanta Movado havas HISTORION?

Ĉu la lernado de la Lingvo Internacia estas utila?

Ĉu dum la jaro 2000 la homaro jam solvos la malsato problemon?

Kiu estas la problemo plej grava, kiun nuntempe travivas la gejunuloj?

Ĉu la muzikaĵoj «JE JE» enhavas valorajn muzikajn ecojn?

Kion vi scias pri TEJO?


Atendante senpacience vian aliĝon al la Kongreso ni memorigas vin, ke ĝi okazos ekde la 19-a ĝis la 23-a de julio en la fama norda urbo Bilbao. Ĝis revido .

HEJS-Estraro

Mi starigis Esp-Muzeon kaj mi posedas bibliotekon kun mil volumoj pri nia lingvo. Eble oni povus helpi min per la sendado de libroj kaj revuoj. Indiku viajn dezirojn kaj emojn. S-ro Luis M.ª Hernández Izal, farmaciisto. Apartado 83, Villafranca del Panadés.

ĈE LA SOJLO DE L' MISTERO

(Meditado de maljunulo)



Jen fine mi alvenis
ĉe l' sojlo de l' mister'.
Sed kio venos poste?
Ĉu plena malaper'?

La karno ja foriĝos;
ĉu same la spirit'?
Ĉu nenion ni alportos
post fin' de l' huna viv'?

Ĉu amo kaj malamo,
gajeco kaj dolor',
finita estos ĉio
post la lasta vivhor'?

Ho, terura demando!
Ve, timiga mister'!
Nur plena fido en Dio
povas respondi en ver'.

VIRGILIO

Bilbao, februaro 1966.

JUNULARA RESTADEJO

La Junulara Sekcio de HEF intencas konstrui HEJS-Restadejon, Rifuĝejo, kies nomo estos «HEF JUNULARA RESTADEJO ESPERANTISTA HEJS».

La tereno akirita de HEJS, por ĝin konstrui estas de nun je la dispono de ĉiuj esperantistaj kluboj, sekcioj kaj asocioj.

Informos: HEJS-Prezidanto, Salvador Aragay, str. Arce 8, 2.º, 4.ª CORNELLA (Barcelona).

HISPANA ESPERANTO AŬRORO

Según amable comunicación de su secretario, Sr. Osuna, la Junta Directiva que ha de regir el ejercicio durante el año 1966, ha quedado constituida así:

Presidente:	D. Angel Figuerola Auque.
Vicepresidente:	D. Mariano Izaola Martínez.
Secretario:	D. Julio Osuna Fajardo.
Vicesecretario:	D. José Tormo Cisternes.
Tesorero:	D. Francisco Vidal Muñoz.

GRUPO «FIDO KAJ ESPERO»

El 13 de enero, el Grupo Eperantista y la Sociedad de Amigos de la Lengua y Cultura Alemanas, organizaron en el Salón del Colegio Universitario de "Santa Cruz", una Proyección de Documentales cedidos amablemente al Grupo por la Embajada de Francia. Dos nuevas proyecciones tuvieron lugar los días 2 y 6 de febrero. La primera de documentales franceses fue organizada por el Grupo; el segundo, de documentales alemanes, por la Sociedad Alemana. Es de notar el hecho de que en ambas ocasiones asistieron miembros de ambas sociedades, haciendo así posible iniciar una colaboración entre las mismas. Durante la sesión de cine del día 2 se distribuyeron numerosos ejemplares de nuestra hoja informativa sobre el Esperanto en lengua española.

El día 6 de febrero, en el domicilio del Grupo se celebró una reunión general para elegir la nueva Junta Directiva que guíe en el futuro el trabajo en favor del Esperanto. Después de un fructífero trabajo a lo largo de muchos años, cesó como Presidente don M. Cantalapiedra y fue elegido nuevo Presidente don G. Castañón, hasta entonces tesorero, fervoroso esperantista de quien esperamos grandes frutos.

La nueva Junta ha quedado, pues, así:

Presidente:	D. Gonzalo Castañón.
Vicepresidente:	D. Rafael Sánchez.
Secretario:	D. Luis Hernández.
Vicesecretaria:	Dña. Rafaela Urueña.
Tesorera:	Dña. Carmen Conde.
Contador:	D. Francisco Castañón.
Bibliotecario:	D. Jacinto Urueña.
Vocal:	D. Antonio Gamboa.
Vocal:	Dña. Concepción Rodríguez.
Vocal:	D. José María Zalama.

La nueva dirección del Grupo es la siguiente: calle Angustias, núm. 47, 2.º izqda. Valladolid.

L. HERNANDEZ

GRUPO «STELO DE PACO»

(Resumo de la agado dum la jaro 1965)

El la plej elstaraj aranĝoj organizitaj de la Grupo dum la pasinta jaro, estas menciindaj la jenaj:

Prezentado de koloraj lumbildoj kun klarigoj en esperanto surbendigitaj de S-ano Petro Nuez, kiuj atingis grandan sukceson.

Sed la plej grava evento estis, ke unuafoje en la historio de Esperanto en nia urbo, la Grupo honoriĝis prezentante al siaj anoj sonfilmojn dialogitajn en Esperanto, kies sukceso estis apoteoza, ĉar la grupejo rezultis malgranda por enteni



ĉiujn ĉeestantojn.

Oni celebris ankaŭ kun plena sukceso, la 106an datrevenon de la naskiĝo de Dro. Zamenhof. La festo konsistis el komuna vespermanĝo kiu okazis la 18an de decembro en la halo de la Kooperativo. La nombro de la partoprenintoj estis 49, kaj tuj post la vespermanĝo havis lokon la dua prezentado de sonfilmoj en Esperanto. Al la menciitaj 49 partoprenintoj sumiĝis aliaj samideanoj kiuj ne povis ĉeesti la vespermanĝon. Entute pli ol 70 personoj.

Oni organizis kiel ĉiujare kursojn de Esperanto, sed domaĝe la ĉeestantoj ne estis multenombraj, kion ni tre bedaŭras, ĉar tio estas la kerno de nia agado kaj fundamento de nia Grupo.

La Grupo partoprenis oficiale kelkajn aranĝojn fare de aliaj esperanto-societoj: la ĉiujaran datrevenon de la fondiĝo de la kamarada Aŭroro; la XXVIan. Esperantan Nacian Kongreson okazintan en Palencio; la ĉiujaran Provincan Renkontiĝon en la urbeto Molins de Rei.

Por la prestiĝigo de Esperanto en la homaraj aktivecoj kaj internaciaj rilatoj, oni sendis leteron al la alta Direkcio de Unesco kun la peto estu publikigita ankaŭ en Esperanto ĝia oficiala bulteno «Kuriero de Unesco».

Tiel same oni partoprenis per kolektado de subskriboj, la Jaron de Internacia Kunlaborado.

Estis rememorataj kaj plendataj la forpason de niaj karaj samideanoj, D. Dalmau, honora membro kaj honora Prezidanto de nia Grupo, D. Masachs kaj J. Aznar, ankaŭ membroj.

Dum la pasinta jaro aliĝis 5 novaj anoj en la Grupon.

Oni ricevis la viziton de la jenaj eksterlandaj esperantistoj: unu usonano kiu dancis indianajn dancojn; du nederlandanoj, du germanoj, tri francoj, unu svedo, du argentininoj, du aŭstroj kaj unu polo. Oni regalis iujn el ili.

Ĉiusabate, nokte, formiĝas instrua babila rondo.

Oni enkalkulis 70 anojn.

La grupestraro kore salutas la similajn organizojn.

ESPERANTO SOCIETO DE TENERIFO

El la informoj senditaj al ni de la Sekretario de la Societo S-ro Régulo ni eltiris la jenon:

De la 12a de septembro ĝis la 12a de oktobro 1965, la Esperantista Societo organizis Filatelan Ekspozicion, en kunlaboro kun la Filatela Societo de Tenerifo kaj en la kadro de la tradiciaj Septembraj Festoj de La Laguna. La tuta aranĝo estis tre sukcesa, kaj dum la malfermo ĉeestis la urbestro de La Laguna, la Rektoro de la Universitato kaj aliaj aŭtoritatoj. La Esperantista Societo profitis la okazon, ke aperis poŝtmarko kun la bildo de la misiisto Anchieta, naskiĝinta en La Laguna, por organizi la ekspozicion kaj samtempe propagandi nian lingvon. Apud la montrofenestroj kun la poŝtmarkoj, estis ekspozicio de libroj esperantistaj kaj multaj homoj demandis pri Esperanto kaj ricevis respondojn kaj propagandajn foliojn kaj broŝuretojn. La gazetaro de la ĉefurbo raportis plurfoje pri la ekspozicio kaj ankaŭ la radio kaj la televido. La Esperantista Societo de Tenerifo ricevis prestiĝan propagandon, kaj en ĝi nun ekformiĝas Filatela Sekcio, kiu kunvenas en la ejo de la Societo ĉiudimanĉe matene.

Kiel kutime, por celebri la naskiĝon de Zamenhof oni vizitis novan lokon de Tenerife, en ekskurso, kiun organizis la Societo. Ĉi jare la vizito okazis al la nord-insula komunumo La Guancha, en kies loka kultura societo okazis publika kunveno por informi pri Esperanto kaj la Esperanto-movado. Parolis la Prezidanto de la loka kultura societo kaj poste la Sekretario de la Esperantista Societo de Tenerifo S-ro Régulo Pérez faris paroladon pri la signifo de Esperanto. En la fino estiĝis interesa diskutado, en kiu partoprenis multaj el la aŭskultantoj, kiuj plenigis la grandan salonon. La ekskurson partoprenis 40 gesamideanoj (kun familianoj); en La Laguna, kaj en La Guancha aliĝis al ĝi S-ro Manuel Manteca, Notario en Icod, kun kelkaj samideanoj el Icod. La tuto bone sukcesis kaj same la loĝantoj de La Guancha kiel la partoprenintoj restis tre kontentaj.

Oni diris al ni...

- Ke la konata studcentro C.C.C. de San Sebastián (Hispanio), preparas Esperanto-kurson. Espereble ĝi atingos sukceson similan al tiu de la aliaj eldonaĵoj de tiu grava Centro.
- Ke en marto aŭ aprilo aperos la jam delonge bezonata vortaro Hispana-Esperanto de Dro. Tudela. Informojn liveros la aŭtoro (Ruzafa, 41, VALENCIA).
- Ke en tre proksima estonto aperos dulingva vortaro Hisp.-Esp. Esp.-Hispana. La Eldonejo (kies nomon oni ne indikis al ni) estas grava eldona firmo, kaj la aŭtoro (kies nomon ni ankaŭ ne konas) estas malnova esperantisto. La vortaro enhavas 35.000 slipojn, aperos poŝformate kun 400 paĝoj, bela prezento kaj multnombra eldonkvanto. La prezo estos surprize malalta: 30 (tridek) pesetojn po ekzemplero. Ĉu tiu revo realiĝos? — Ni tion esperu!

DIVERSAĴOJ

La «Deutsche Zentrale für Fremdenverkehr» (Germana Centro por Turismo) eldonis tutkoloran faldfolion en Esperanto, pri la urbo Mannheim.

La hispana agentejo de tiu Centro (F. B. Gier, Castellana, 1, MADRID-1) sendas ekzempleron kontraŭ reafranko.

Estus interese, se niaj Grupoj mendus kvanton por sia membraro.

Internaciaj Feriaj Kursoj en Helsingor, Danlando, la 17-24an julio 1966.
Mendu interesan prospekton kun informoj al la jena adreso:

Sro. L. Friis, Ingemannsvej, 9, AABYHOJ, Danlando.

Ĉiu homo deziras vivoĝojon, sed ne ĉiam atingas ĝin. Tial estas treege grava demando, ĉu la vivo estas nura hazardo, aŭ ĉu ĝi funkcias laŭ certa sistemo, kiun oni povas lerni koni. Petu senpagan ilustritan faldprospekton ĉe Martinus Instituto, Mariendalsvej, 94-96, Kopenhago F., Danlando.

DONATIVOS RECIBIDOS PARA BOLETIN

Nombre	Ciudad	Pts.
E. Domingo	Valencia	50
J. Benito	Zaragoza	60
M. Ortigosa	Zaragoza	10
Un Samideano		500
C. Ezquerra	Barcelona	150
F. Alsina	Barcelona	25
S. Alberich	Barcelona	25
J. Roig	Barcelona	25
M. Alsina	Barcelona	25
L. Bernaerts	Bélgica	25
A. Pastor	Bilbao	100
A. García	Bilbao	25
Familia Criach	Sabadell	250
J. Andrés	Zaragoza	25
A. Bohigas	Barcelona	25
A. Roca	Barcelona	25
"Stelo de Paco"	Barcelona	25
S. Oliván	Vigo	150
R. Herrero	Valencia	190
T. Elizondo	Bilbao	25
A. Alonso	Pontevedra	100
M. Saballs	Aldaya	100
P. González Cantero	Madrid	50
J. Martínez	Bitem-Tortosa	50
R. Gisbert	Barcelona	25
M. Solá	Tarrasa	50
R. Roca	Barcelona	25

SOBRE LAS NACIONES UNIDAS

En cualquier estudio sobre las Naciones Unidas y los Organismos especializados ha de prestarse alguna atención a los motivos que decidieron su fundación, incluso cuando son los niños los que hacen el estudio. Por elemental que sea lo que asimilen, algo han de aprender sobre la razón de ser de las Naciones Unidas y los organismos especializados.

Una manera de enseñarlo es hacer patente que los países, lo mismo que los niños y los adultos, tienen problemas y tratan como los hombres de mejorarse ellos mismos y de mejorar sus relaciones. Otra manera de proceder consiste en procurar que comprendan bien los grandes daños que causan las guerras y en explicarles que los adultos han organizado una gran «junta» internacional para evitar la guerra y mantener la paz. También cabe presentar la materia diciendo que en todas partes las personas mayores se afanan por transformar el mundo para que en el futuro los niños puedan vivir en mejores condiciones. Cuando la enseñanza se dirige a los adultos, las cosas evidentemente son mucho más complejas. A los objetivos principales enunciados en la Carta de las Naciones Unidas había que añadir otros muy diversos, desde el acopio de informaciones fidedignas hasta la ventaja de tener una tribuna internacional donde la opinión mundial pueda expresarse libremente.

Los estudiantes adelantados y los adultos que quieran precisar la parte con que las Naciones Unidas y los organismos especializados contribuyen a formar o a robustecer el sentimiento de la comunidad mundial, pueden dedicarse a establecer la lista de los principales factores que configuran una comunidad y a evaluar la labor de las Naciones Unidas con ese criterio. Entre esos factores están el pasado común, la referencia a las mismas escalas de valores, la lengua, la simbólica, las leyes y las instituciones comunes, la oposición al mismo o a los mismos enemigos y la impresión de afrontar juntos las incertidumbres de lo porvenir. Comprobar cuáles son entre esos factores los que las Naciones Unidas pueden inscribir en su activo será un estudio muy estimulante.

Otro objetivo de las Naciones Unidas y de los organismos especializados está en servir de exponente a los ideales más altos que dondequiera se han propuesto los hombres. Sos sueños y esas aspiraciones han sido enunciados en el preámbulo de la Carta de las Naciones Unidas, en la Declaración Universal de los Derechos Humanos, en el preámbulo de la Constitución de la Unesco y en otros documentos solemnes.

(Hablemos de las Naciones Unidas)

forpasis...

La 12an decembro 1965, forpasis la patrino de nia samideano kaj kunlaboranto S-ro M. López Serna.

Nian plej sinceran kondolencon!

El 10 de marzo del corriente año, a los 47 años de edad, pasó por su transición don Benito Lorizate Ormaechea.

Interesado por el Esperanto, miembro de H. E. F., y entusiasta estudioso de temas políticosociales, fue decidido protector del movimiento esperantista. Amplio de ideas y tolerancia, deja entre sus amigos y conocidos el recuerdo de hombre bueno, inteligente y excelente amigo.

A su viuda y demás deudos va la expresión de nuestra más sincera condolencia.

✱ Ni legis por vi...

HISPANIO POR VI. Máximo. El la hispana tradukis: Nicolás L. Escartín. Eldonis la Subsekretariejo de Informado kaj Turismo. Prezo: 10 *peseojn (havebla senpage ĉe la «Subsecretaría de Información y Turismo», MADRID*).

Jen informplena broŝuro en plaĉa formato, agrabla tipografia aranĝo kaj kun multaj vivaj desegnitaj ilustraĵoj. La broŝuro donas informojn ne nur pri tio, kion vi povos vidi en la lando, sed ĝi donas ankaŭ multajn valorajn informojn pri la karaktero de la hispanoj, ĝi eĉ diras al vi, kiun opinion havas la hispanoj pri la diversaj specoj de turistoj.

Laŭ la teksto en la broŝuro mem ĝi ne estas turisma gvidilo pri Hispanio, nek profunda studo pri ĝiaj estinteco kaj estanteco. Krom neeviteblaj kaj utilaj esceptoj ĝi ne enhavas detalan informadon nek pritraktas detale la historion aŭ nuntempan estadon de la lando, sed ĝi referencas al la fontoj, el kiuj vi povos ĉerpi tiujn detalaĵojn. Ĝi ĵetas rigardojn sur la diversajn terenojn kaj kampojn, kiuj estas interesaj por tiu, kiu ŝatus viziti tiun sunbanitan landon, kiu radikas en malnovega kulturo, kaj kiu havas tiel fierajn tradiciojn.

Kompreneble ĝi priskribas la geografion de la lando kaj donas al vi informojn pri la trafikaj kaj pasportaj faktoj. Prezojn kaj monon ĝi traktas kaj donas ankaŭ konsilojn kaj utilajn informojn pri butikumo.

Kvankam traktita sur malpli ol unu paĝo la hispana pentroarto estas bone prilumita en superrigardo. Vi ekscias pri la influo de Grekujo kaj Romio. Vi aŭdas pri konstruado de la gotikaj katedraloj kaj pri tio, ke Goya revoluciigis la hispanan kaj universalan pentroarton. En la Prado-muzeo en Madrido oni vidas la plej fabelan pentroverkaron el la universala pentroarto.

Kiel atendite priskribo de la taŭroludoj okupas ne malpli ol 5 paĝojn, kiuj donas vivan priskribon.


Ankaŭ pri la trijara enlanda milito, kiu kondukis al la nuntempa reĝimo, estas informite. En mia lando la gazetoj informas, ke en Hispanio la komfortaj someraj vestoj kiel ekzemple «la bikinio» estas severe malpermesitaj. La broŝuro kontraŭdiras tion donante konsilojn pri la uzado. Ankaŭ pri salutmanieroj, fumado, trinkado kaj pri invitoj troviĝas multaj konsiloj.

La broŝuro finas jene: «Se vi legis la lastan parton de ĉi tiu broŝuro kun iom da atento, permesu al ni, ke ni, krom danki al vi pro tio gratulu al vi kaj al ni. Ni enkalkulas vin kiel amikon, kiu konas nin sufiĉe bone antaŭ ol alveni. Sincere ni diras al vi: Hispanio por vi, amiko».

La aŭtoro nomas sin Maximo kaj li mem faris ankaŭ la tutan aranĝon, kovrilon kaj desegnaĵojn, kiuj aperas en du koloroj. La traduko estas farita de Nicolás L. Escartín, kies facile komprenebla lingvo troviĝas sur plej alta nivelo. La prezo estas ridinde malalta, nome 10 pesetoj, kaj mi varme rekomendas al vi nepre aĉeti unu ekzempleron ĉe: Subsecretaría de Turismo. Ĝi pli ol valoras tiun sumeton.

Koran gratulon al la iniciatintoj pri la eldono en la internacia lingvo.

IB SCHLEICHER (Danlando)



Vista parcial de la interesante exposición Esperantista organizada en EL FERROL DEL CAUDILLO, con motivo del día de Zamenhof.

ESPERANTO KAJ LA LITERATURO

Johano Velez (Barcelona)

Kiam L. L. Zamenhof komencis sian luktadon por diskonigi sian kreitaĵon, inter diversaj tre gravaj faktoroj kontribuantaj al ĝia ĉies akcepto kaj alpreno, li tuj pripensis pri la unuaranga rolo de la literaturo en la trafa efika disvolvado de Esperanto. Pro tio li rapide iniciatis novan taskon en sia tre laborŝarĝita vivo. Li verkis originale en Eo. kaj tradukis la plej mondfamajn librojn en ĝin. Sen tiu rimedo, malfacile Zamenhof estus povinta evidentigi la taŭgecon de sia lingvo. Eĉ se nia Internacia Lingvo povus sukcesi sen la helpo de la literaturo, Esperanto ne estus praktika kreitaĵo, ĉar la literaturo estas la fundamento de ĉiu ajn idiomo. Kun literaturo, lingvo vigle progresas, evoluas, ĝi atingas altvaloran riĉecon; sen ĝi, lingvo apenaŭ vivetas, ĝi nepre dekadencas kaj fine mortas. La influo de najbara idiomo kun literaturo akcelas ĝian vakon kaj forpason.

La literaturo, ni ĵus diris, estas la fundamento de lingvo, kompreneble la kultura historia fundamento, ĉar la homo-faktoro estas en la ĉies deveno..., sub la gvidado de Dio. Por scii kiel vere estas idiomo oni devas trastudi sur prefero al ĝia gramatiko, ĝian literaturon, ekz., por koni la hispanlingvon de la Cervantes epoko, ĉu prefere estas konsulti tiamajn gramatikojn —se oni sukcesas trovi unu el ili, aŭ legi la libron Don Kiĥoto? La parolmaniero de la popolo, bona aŭ malbona, estas la vera lingvo, kiu estas kvazaŭ vivanta organismo dank'al homkomunumo, kaj estas la literaturo, kiu atestas kaj spegulas ĝin.

Oni ne suspektu, tamen, ke ni arbitre flankenlasas la gravan rolon de la gramatiko. Speciale, ĝi estas absolute necesa. Se Shakespeare, Dante, Cervantes, verkis laŭ la akirita lingva evoluo de iliaj koncernaj samlandanoj, samtempe ili estis devigitaj elpensi ne nur novajn vortojn, sed ankaŭ nepre novajn deklinaciojn kaj regulerojn. Grandparte, tiuj aŭtoroj, kun aliaj, estas la ĉefenteno de la postecaj gramatikoj, kiuj pri kapriceco pekas same, kiel tiuj geniuloj.

Krom la miriga simpleco de la esperanta gramatiko, ĝi estas esenca, kerna, en la starigo kaj antaŭeniro de la Internacia Lingvo. La rolo de la gramatiko en Esperanto plikreskiĝas, ĉar ĉi tiu lingvo ne naskiĝis, kiel okazas ĉe la naciaj, el ajn popola parolmaniero, el la kultura atestilo de la literaturo.

Sur la principo de senpartieca internacia vortaro, ĝi naskiĝis spontane, kvazaŭ el aŭ per si mem. Kiam Zamenhof elpensis sian gramatikon, sur la genia simpleco kaj mallongeco de 550 vortoj— el kiuj konsistas la Plena Gramatiko de Esperanto— ekis neŭtrala lingvo por la tuta mondo.

Sed ĉiu movado —ĉu nacia, ĉu internacia— necesas krom samideanismon aŭ samidealismon, ankaŭ komunan kulturon. Tio ĉi lasta en la Esperanta Movado estas kerna. La interhoma komprenemo kaj amikeco estas la rezulto de la kuriozeco, de la scivolemo pri la ekzisto de la homoj kaj la popoloj. La literaturo helpas altgrade tiun celon, kaj dank' al Esperanto oni povas certigi la ĝojigan ŝprucadon de nova tre vigla renaskiĝinta literaturo tutmonda, originala, vastega, impresiga. Ĉiu popolo elverŝanta en unikan lingvon sian fundamentan karakterizon, sian diversnuancan karakteron, sian angoron, sian esperon. Hodiaŭ, tiu literaturo jam estas grava, tre grava.

Sed koncerne la hispanajn geesperantistojn, mi timas, ili ne tro multe ĝis nun kontribuis kiel verkistoj al ĉi tiu feliĉa evento. Kio do atendigas ilin? Nia sola miraklopovo estas nia laboro.



ASOCIACION NACIONAL DE FERROVIARIOS ESPERANTISTAS

HISPANA ESPERANTO FERVOJISTA ASOCIO (H. E. F. A.)



Dado el éxito de los cursos anteriores, queda abierta la Matrícula GRATUITA para todos los ferroviarios y familiares de ambos sexos, para

EL CURSO DE ESPERANTO, 1966.

El curso dará comienzo el día 7 de febrero de 1966, de 19,30 a 20,30 horas:

Los días de Clase serán los

LUNES - MIERCOLES - VIERNES

en una de las Aulas cedidas por la Asociación General de Empleados y Obreros de los FF. CC. de España, Atocha, 83, para estos fines culturales.

Pueden matricularse todos los que quieran tomar parte en el "Curso ESPERANTO, 1966", presentándose de 19,30 a 20,30 horas en la Biblioteca de la Asociación General.

La clausura del curso se celebrará el 30 de abril de 1966, con imposición de "Stelo" y exposición de fin de curso con motivos turísticos y culturales de veinte países.

MUY IMPORTANTE

Todos aquellos alumnos que finalicen el Curso, podrán "asistir si lo desean" al 18 IFEF, Congreso Internacional de Ferroviarios Esperantistas que se celebrará D.m. del 14 al 20 de mayo de 1966 en la interesante ciudad de UTRECH (Holanda), en el que participarán ferroviarios y familiares de Alemania - Australia - Austria - Bélgica - Bulgaria - Checoslovaquia - Dinamarca - ESPAÑA - Finlandia - Francia - Holanda - Hungría - Inglaterra - Italia - Yugoslavia - Polonia - Suecia - Suiza y Noruega, donde todos los participantes se entenderán hablando el idioma Internacional ESPERANTO.

Madrid, enero de 1966.

CURSOS DE ESPERANTO POR CORRESPONDENCIA

de la FEDERACION ESPAÑOLA DE ESPERANTO

Calle Forn, 21 MOYA (Barcelona)

Centro Autortzado por el Ministerio de Educación Nacional con el n.° 68

deziras korespondi...

HUNGARUJO.—Uttôroház, Budapest XIV. Május L. u. 3., D-ro. Dénes Kusztos, kursgvidanto, deziras korespondamikojn por siaj gekursanoj (11-14 jaraĝaj). En la kadro de U Kongreso okazos en Budapest, juna, frata renkontiĝo, korespondado helpas junan, fratan amikecon.

ĈEĤOSLOVAKIO.—Hranice Na Mor, Fučikova 555, F-ino. Olga Libosŝvárová, deziras korespondi pri ĉiuj temoj.

FEDERACION ESPERANTISTA ESPAÑOLA

TESORERIA

Balance en 31 de diciembre de 1965

COBROS

Superávit del año 1964		15.400,45	
Cotizaciones	57.173,—		
Complementos voluntarios cotización	1.003,—		
Cuotas del extranjero	3.056,—		
Donativos	2.731,—		
Venta de material y diplomas	1.835,—		
Derechos de examen	100,—		
Intereses	90,—	65.988,—	81.388,45

PAGOS

BOLETIN: Composición e impresión ...	41.490,80		
Fotograbado	4.616,30		
Sobres	1.150,—		
Gratificación Director	1.000,—	48.257,10	
Cuota de U. E. A. 1965	3.920,—		
Informaoficejo	2.000,—		
Impresos de propaganda	2.356,90		
Papel, sobres y postales	992,55		
Impresos	305,—		
Sellos de correos	4.394,20		
Telegramas	156,—		
Tasas y pólizas	146,—		
Arreglo y cintas máquina escribir	303,—		
Factura Octavio y Félez	243,—		
Transportes	25,—		
Lotería	60,—		
Corona P. Casanovas	750,—		
Diccionario para H. E. F.	75,—		
Libros regalados	170,—		
A U. E. A. para J. I. K.	835,—		
Obsequio a los congresistas en Palencia ...	992,40	17.724,05	65.981,15
Superávit en 31 de diciembre de 1964 ...			15.407,30

La Tesorera,
MARIA PILAR GOMEZ

ELDONA FAKO DE H. E. F.

La Eldona Fako se creó con el fin de, por medio de objetos de propaganda, recaudar fondos para la creación de premios que estimulasen la labor de los esperantistas.

He aquí las cuentas de esta sección:

Capital a amortizar			13.963,20
INGRESADO			
Por venta de diversos objetos		11.445,85	
GASTADO			
Folletos turísticos de Palencia	1.982,10		
Libro-obsequio al conferenciante de HEJS.	220,—	2.202,10	
Amortización de capital			9.243,75
Debe la Eldona Fako			4.719,45

Zaragoza, 31 de diciembre de 1965.

INES GASTON

LIBROSERVO DE H. E. F.

Las cuentas de Libroservo, las presentaremos en cuanto nuestro antecesor nos haya remitido las correspondientes al año 1964.

Zaragoza, 31 de diciembre de 1965.

INES GASTON — NICOLAS L. ESCARTIN

AL VENKO

J. Baghy

Jen granda tag':
flirtas la flag',
ŝvelas la brustojn nova sento.
Triumfanta kant'
de Esperant'
eĥas miloble tra l' silento.
Ĝojrozo pompas sur la vang',
aklame kantas ĉiu lang':
«Al venko! Al venko!
Al fina glora venk'!»

Jen verda stel'
lumas al cel'.
Vojon ĝi montras al homaro.
Pro sankta flam'
mortos malam',
falos en polvon ĉiu baro.
Ĝi kreas por eterna glor'
la novan mondon en la kor'
«Al venko! Al venko!
Al fina glora venk'!»

Homama ver'
regos sur ter'.
Bonon alportos nia peno.
Post vivofin'
sekvos ja nin
de la homaro — danka beno.
Libere flirtu verda flag'.
proksime estas jam la tag':
«Al venko! Al venko!
Al fina glora venk'!»

TIP. C. BOLOIX.-REINA FABIOLA. 7.-ZARAGOZA

D. L. Z. - 375 - 63